

Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2017

Jarkolekto 4 - Numero 1



FILATELICO - NUMISMATICA

**CIRCOLO FILATELICO
NUMISMATICO MONTAGNANA**

ENHAVOTABELO

de januaro 2017

| | |
|--|----|
| Titolpaĝo | 1 |
| Enhavotabelo | 2 |
| De ni por ... ni | 3 |
| Moneroj & medaloj | 4 |
| <i>Antverpena medalo (ĉirkaŭ 1928)</i> | |
| <i>Mendilo (ĉirkaŭ 1928)</i> | |
| <i>Antverpena UK-medalo (1928)</i> | |
| <i>Duobla jubileo-medalo(2012)</i> | |
| Aspektoj de numismatiko: Kolekti kaj ordigi medalojn (1) | 9 |
| Spikumaĵoj kaj suplementoj: | 10 |
| Ununura esperanta numisletero | |
| Medalistoj: 7. D-ro Krzysztof Kmiec (1950 – 2011) | 11 |
| Historiaj aspektoj: | 12 |
| Moneroj de Amikejo, iama virtuala ŝtat(et)o esperantista | |
| Por spuremuloj | 17 |
| Retpoŝto | 18 |
| Anoncoj & eventoj | 39 |

Tajpado & paĝaranĝo: Vivienne Tudts

bert.boon@skynet.be

Provlegado: Jozefo Horvath

www.esperanto.es/biblioteko

Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!

www.kolektado.esperanto.cc

Finredaktoro: Bert Boon

www.bildarchivaustria.at

DE NI POR ... NI!

La jarŝanĝo troviĝas jam kelkajn semajnojn malantaŭ ni. Do, ĝustatempe ni povas proklami al vi la starton de la kvara jarkolekto de nia revuo “Esperanta Numismatiko”.

Dum la tri pasintaj monatoj nia asocio denove kreskis dank’al la membriĝo de tri belgoj, unu kubano, unu koreo, unu ĉeĥo kaj unu iranano. Ni tutkore dankas kaj bonvenigas ilin en nia numismata rondo kaj esperas, ke ili estos dumvivaj membroj. Do, tiel la aktuala nombro de membroj estas 58! En la pasinta jaro entute aliĝis 15 personoj. Vere granda sukceso!

Eksterordinara novaĵo venis el Koreio, el la ĉefurbo Seulo, kie en la somero de 2017 okazos la 102a Universala Kongreso de Esperanto. Dank’al individuaj kontaktoj kun la LKK-respondeculo pri filatelo, s-ro KANG Hongku, ENA sukcesis konvinki la Lokan Kongresan Komitaton (LKK) emisii specialan memorigan medalon okaze de la ĉi-jara UK. En 2017 la LKK de Seulo krome decidis pri la eldonkvanto de la nova medalo. Evidente ni informos vin ĉiujn ĝustatempe per ĉi revuo, aŭ eventuale per speciala reta mesaĝo, pri la kondiĉoj kaj eblecoj mendi minimume unu ekzempleron (vidu ankaŭ la rubrikon “Retpoŝto” p.26).

En la kvara numero de la 20a jarkolekto de la numismatika revuo “Flash Medailles” de la asocio dulingva “Promocio de la Medalo” (Belgio) aperis artikolo sub la titolo “Esperanta Numismatiko” (p. 265 – p. 271). Krome, je la 8a de decembro 2016 dum jarfina festo kun bankedo de la loka belga numismatika grupo “Numismatica Tienen” okazis prelego en la nederlanda pri ENA (*raporto troviĝas en la rubriko “Anoncoj & Eventoj” p. 40*)

Permesu, ke ni nun donu al vi, karaj gelegantoj, koncizan superrigardon pri la enhavo de ĉi numero. Kompreneble la ĉefa rubriko estas kaj restos tiu pri moneroj kaj medaloj. Belega kaj unika belga medalo, kun du variantoj, estas la temo de la ĉi-foja rubriko. Krome, tiu memoriga medalo estas la nura esperanta medalo ĝis hodiaŭ emisiita en lando, kies ĉefurbo estas konsiderata la ĉefurbo de Eŭropo, la eta lando Belgio kun ne malpli ol tri oficialaj lingvoj!

Alia rubriko pritraktas vere neordinaran historian ĉapitron pri stranga numismatika evento, kiu okazis flanke de la sama eta lando. Malkovru do la iaman regionon kun la nomo “Amikejo”, apud la komuna limo de la tiamaj Belgio, Germanio kaj Nederlando.

Aperas krome nova rubriko: POR SPUREMULOJ. Ni petas ĉies helpon por trovi informojn pri bildoj de numismatikaĵoj en niaj arkivoj. Ĉu scivolema? (*Vidu sur p. 17! Dankon!*)

Evidente vi retrovos multajn aliajn kutimajn rubrikojn kaj eĉ povos konstati, ke ne nur la nombro de membroj kreskadas sed ankaŭ la nombro de mesaĝoj en la rubriko “Retpoŝto”. ENA vivas... kaj fieras montri tion al Esperantujo!

Bert

MONEROJ & MEDALOJ

1 Tipo A 1 – Esperanto-medaloj

“FLUGAS FORTA VOKO ...”



Lando: Belgio
Metalo: bronzo
Diametro: 50 mm
Jaro: 1927 (?)

Kvanto: nekonata
Pezo: 62,64 g
Medalisto: Rik Sauter
Diko: 5 mm

Averso:

Majusklo E. (stampita profunde) kun enskriboj. En la horizontalaj traboroj malsupren: “FLUGAS”, “FORTA” kaj “VOKO”. En la vertikala trabo malsupren: “TRA LA MONDO”. Maldekstre apud la majusklo: malgranda stelo.

Reverso:

Zamenhofa busto, rigardanta trikvarone dekstren. En la dekstra rando: D^{RO}LL ZAMENHOF. Maldekstre de la kolumo: *Rik Sauter*.

Rimarko 1:

Mankas eldonjaro. Tre probable ne mallonge antaŭ la jaro 1928.
Mankas informoj pri eventuala instiga evento. Krome mankas la identeco de komisiinto(j).
Traserĉado de la arkivaro de Rik Sauter estas farenda.

Rimarko 2:

La vortoj en la majusklo estas la dua verso de la zamenhofa poemo “La Espero”. (*Tamen la originala tekstas jene: Tra la mondo IRAS forta voko. – Nd. Jozefo Horváth*)



Bronza Medaljono de D-ro Zamenhof

MENDILO

Mi petas "BELGAN ESPERANTO-INSTITUTON", 11, Kleine Hondstraat, Antverpeno, havigi al mi ekzemplero.....n de la **bronza medaljono de D-ro Zamenhof**, skulptita de Rik Sauter.

Mi sendas al ĝi sumon de Belgoj (po 9 Belg.)
al poŝtĉeko N° 1689.58 — per poŝtmandato — bankĉeko —
monbiletoj en registrita letero.

Nomo

Strato

Urbo kaj lando :

Dato :

Subskribo :

Al la 100 unuaj mendantoj ni konsentas favorprezon de Belgoj 9.—
Pago al nia poŝtĉekkonto 1689.58 aŭ per bankĉeko aŭ poŝtmandato.

Ni publikigos la nomaron de la 100 unuaj mendantoj. Post apero de
tiu nomaro la prezo definitiva de la medaljono estos Belgoj 10.—

2 Tipo A 1 – Esperanto-medaloj

Universala Kongreso 1928 en Antverpeno (*variante A*)



Lando: Belgio

Metalo: bronzo

Diametro: 50 mm

Jaro: 1928



Kvanto: nekonata

Pezo: 52,42 g

Medalisto: Rik Sauter

Diko: 4 mm

Averso:

Ĉirkaŭa skribo: “20a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. Horizontalaj skriboj malsupren: ANTVERPENO 3-11 Aŭgusto 1928 LA LOKA KONGRESA KOMITATO DANKEME AL ... PRO AFABLA KUNHELPO EN LA KONGRESLABOROJ.”

Fone, post la skriboj, apenaŭ videbla steleto!

Reverso:

Vidu la reverson de la antaŭa medalo.

Rimarko 1:

Ĉi ekzemplero estis donacita al du fratinaj kunlaborantinoj: F-INOJ VAN DER VEKEN

Rimarko 2:

Tre verŝajne (*vidurimarkon 1 de la antaŭa medalo*) la sama gravuristo kreis novan porokazan averson por la UK 1928, ĉar sur la medalo ne estas menciita nomo de alia gravuristo.

Rimarko 3:

En la trabo, sube, estis permane gravurita(j) nomo(j) de unuopaj kunlaborantoj aŭ grupoj.

Rimarko 4:

Pri la medalo kaj la oficiala enmanigo ne troveblas informoj en la 1928a Kongresa Libro. Verŝajne la enmanigo okazis iam kaj ie post la UK!

3 Tipo A 1 – Esperanto-medaloj

Duobla jubileo en la jaro 2012 (*variante B*)



| | |
|-----------------------------|----------------------------------|
| Lando: Belgio | Kvanto: latunaj: 80; arĝentaj: 6 |
| Metaloj: latuno kaj arĝento | Pezo: 50 g |
| Diametro: 50 mm | Skizo: averso > Johan Doperé |
| Jaro: 2012 | reverso > Rik Sauter |
| Diko: 4 mm | Medalisto: Paul Huybrechts |

Averso:

Emblemo de SEL-T LA HIRUNDO, loka 3a esperanto-grupo de Tienen (Belgio). La emblemo montras la verdan esperantan stelon kun flava mano salutanta skoltmaniere, flugantan hirundon kaj violkoloranskoltan lilion. Datoj: 1992 – 2012. Skribo: “La Hirundo” Skolta Esperanto - Ligo Tienen.



Reverso:

Bazo estis la reverso de la originala Sauter-a medalo. Ŝanĝoj: Paul Huybrechts (inicialoj PH sub la busta mentono) delokis la nomon de Rik Sauter SUR la kolumon kaj aldonis la datojn 1887 – 2012, pro la 125-jara jubileo de Esperanto.

Rimarko 1:

La latunaj ekzempleroj estis permane patinigitaj; ili aspektas iom malpli brunaj ol bronzaĵ medaloj.

Rimarko 2:

1992 – 2012: 20-jara jubileo de SEL-T La Hirundo.

1887 – 2012: 125-jara jubileo de Esperanto

Rimarko 3:

La latunaj medaloj estas vendataj kontraŭ 18 eŭroj + sendokostoj (registrite).

Rimarko 4:

La medalo estas interesa kolektaĵo por esperantaĵo-kolektantoj, skoltaĵo-kolektantoj kaj por kolektantoj de urbaĵoj pri la urbo Tienen.

ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Kolekti kaj ordigi medalojn (1)

1. Kolekti

Medaloj estas kolektataj, ĉar ili estas kolektindaj. *Kolekti* estas kunigi objektojn kaj eventuale ordigi ilin. Kolektado estas ŝatokupo, ne malofte ankaŭ investado. La kolektant(in)o celkonscie serĉadas tiujn medalojn, kiuj emocie vibrigas ŝin aŭ lin. Evidente, medalo ne elvokas samspecajn emociojn ĉe diversaj personoj, sed tamen la resonado inter medalo kaj medalkolektanto estas esenca. Ĝi funkcias kiel perilo inter artisto kaj kolektanto. Estiĝas dialogo per signoj, alivorte per ikone sendata mesaĝo. La emocio klare superregas la rilaton kaj gajigas la kolektanton, vekas neordinaran, varman senton. Ju pli universala la mesaĝo de la medalo, des pli homoj entuziasmiĝas, eĉ trans multaj epokoj kaj jarcentoj. Tial artaĵoj el la antikva epoko eĉ nun povas kortuŝi nin. Same evidente en la medalarto!



Numismatika ekspozicio en la Esperanto-muzeo de Svitavy



Vitroŝranko kun parto de privata kolekto

Artaj medaloj ne daŭre kuŝu en kestoj, skatoloj aŭ en monkelo. La rilato inter artisto kaj kolektanto estu senĉese varma kaj la kontakto inter artaĵo kaj mano ne tro longe estu interrompita. Se kolektanto volas ĝui impresojn, liaj trezoroj ne kaŝe dormu en tirkestoj. Hejme li instalu propran vitroŝrankon kun facile malfermeblaj pordetoj. Rekomendinde estas ŝranko kun spigulo kiel fono. Tiel sufiĉas montri nur unu ekzempleron de ĉiu tipo aŭ varianto. Se eble, li almenaŭ unu fojon partoprenu en numismatika ekspozicio.

Medaloj fojfoje bezonas purigon kaj prizorgadon. Plejble malofte tamen! Lavado per pura akvo sufiĉas por forigi la plimulton de malpuraĵoj. Neforigeblaĵojn oni enkaŭstiku per neŭtrala vazelino. Sekve oni milde poluru la medalon per delikata, perkala tuko. Post zorga sekigo, oni surmetu tre maldikan tavolon da abelvakso por eviti oksidiĝon, kaŭzatan de la haŭto de la fingroj.

Daŭrigota

SPIKUMAĴOJ KAJ SUPLEMENTOJ

La ununura esperanta numismatika letero



La koverto: mezuroj: 162 mm x 114 mm; pezo: 27g

La monero: vidu jarkolekton 3, numeron 4, p. 7

La poŝtmarko: valoro: 30 centavos; eldonjaro 1990; unuataga stampo: 14.7.1990: limigita eldonkvanto: nur 1.500 poŝtmarkoj

La teksto (en la hispana kaj en la germana):

Esperanto – una lengua universal

En Julio de 1990, el jefe revolucionario, Fidel Castro llevó a Cuba el 75 Congreso del Esperanto. El objetivo del gremio internacional era ayudar a conseguir que el Esperanto tuviera una mayor significación como lengua universal conjunta. ¿Qué mejor lugar para llevarse a cabo que en Cuba, la amante de la paz? El Esperanto fue elaborado por el oftalmólogo polaco Ludwig Zamenhof. La lengua debe de servir al entendimiento internacional de los pueblos. El 75 Congreso del Esperanto en la Havana es una fuerte garantía para la paz mundial. La Cuba revolucionaria ayuda a derribar la torre de Babel – símbolo de la confusión de las lenguas. El anillo alrededor del globo terráqueo simboliza la fuerza que une a los pueblos del Esperanto socialista.

Moneda

Valor: 1 Peso
Aleación: Cu/Ni
Conservación: Estampado brillante
Año de acuñación: 1990
Borde: liso
Anverso: Globo Terráqueo con el retrato del inventor del Esperanto Ludwig Zamenhof
Reverso: Escudo de Cuba

Sello

Valor: 30 Centavos
Año de emisión: 1990
Primer día de sellado: 14. 7. 1990
Edición limitada: 1.500 ejemplares




Esperanto – Mondlingvo. En julio 1990 la revolucia komandanto Fidel Castro bonvenigis la 75an Universalan Kongreson en Kubo. Celo de la internacia komisiono estis emfazi la valoron de Esperanto kiel komuna mondlingvo. Kiu lando estus pli taŭga tiacele ol la pacema Kubo? Iniciatis en 1887 Esperanton la pola okulkuracisto Ludoviko Zamenhof. La lingvo promociu la interkompreniĝon inter popoloj. La 75a UK en Havano estas forta garantio por la monda paco. La revolucia Kubo kunhelpas detruir la Babelan Turon, simbolon de konfuzo de lingvoj. La ringo ĉirkaŭ la terglobo simbolas la popolkunligantan forton de la socialista Esperanto.

MEDALISTOJ

7. D-ro Krzysztof Kmiec (1950 – 2011)

Krzysztof estis polo kaj doktoro estis ankaŭ farmaciisto, rantisto kaj artisto. La unuan 1985. Dum la tuta vivo, li kreis ornamadis ankaŭ siajn librojn ekster Pollando li havis pli ol komunajn ekspoziciojn. Li kreis membroj de Universala (UMEA) kaj honoran insignon.



pri farmacio. Krom sciencisto li universitata docento, espe- ekslibrison li kreis donace en pli ol 2800 ekslibrisojn. Li per propraj ekslibrisoj. En kaj 120 individuajn kaj 150 ankaŭ metalajn insignojn por Medicinista Esperanto-Asocio



Krome insignon faritan por la Medicinista Esperanto- Kongreso Pierre J. de Backer el Kortrijk specialecon de d-ro De Backer, kiu L.L.Zamenhof.



ĉeforganizanto de la unua Internacia organizita en “okcidenta” lando, d-ro (Belgio). Ĝi prezentas medicinan estis okulkuracisto, kiel d-ro

Kromkrome du medalojn okaze de la 80-jariĝo kaj la 100-jariĝo de UMEA, priskribitaj en “*Esperanta Numismatiko*”, jarkolekto 2, n-ro 3, p. 7-8.



Fonto: MIR 24a volumo n-ro 3 (96) Junio 2011 89

Danke al d-ro Vladimiro Opoka pro la tre kompletaj informoj!

HISTORIAJ ASPEKTOJ

Moneroj de Amikejo, iama virtuala ŝtat(et)o esperantista

La t.n. *Respubliko Saugeais* komence estis ŝerco, *Seborga* estiĝis nur pro pretervido dum la itala politika unuigo, *Athos* en Grekujo kaj *Åland* en Finnlando (Suomio) ambaŭ havas specialan politikan statuson. Kaj, antaŭ nur 200 jaroj Neŭtrala Moresnet, “kruĉiga ŝtateto” perdis la hazardan neŭtralecon kaj simple estis aldonita al la nova ŝtato Belgio.

En la suba raporto tamen ne estos parolo pri mondsdua numismatika evento, sed pri monereldono, kiu tute flanke naskis historiajn atestaĵojn numismatikajn.

Pro politika kaj komerca ŝovinismo ĉe kelkaj tiamaj mondestraj potencoj, la ege malvasta ĉirkaŭaĵo de Moresnet, ĉe la trilanda kruciĝo Prusio (Germanio) – Belgio – Nederlando, dum mallonga periodo troviĝis en la centro de la internacia atento. Tial ĝi ankaŭ iĝis numismatika (kaj filatelial!) frandaĵo.

Neŭtrala Moresnet– tiel tekstis la oficiala nomo– estis historia kuriozaĵo en la epoko de la Viena Kongreso, en la jaro 1814. Dum tiu kongreso, en kiu la ĉefa temo estis la reorganizo de Eŭropo, la reprezentantoj de Prusio kaj –Nederlando ne sukcesis trovi kompromison rilate al la eta tortopinto Moresnet. La vera kialo estis la ekonomia ekspluatado de la zinkominejo Galmeiberg, tiam ege grava por la latunindustrio, sekve por la fabrikado de armiloj.

Post la sendependiĝo de Belgio (1830) kaj la transdono de la nederlandaj ŝtatjuraj rajtoj al la nova belga ŝtato, la administradon komune prizorgis belgaj kaj prusaj oficistoj. La du ŝtatoj dividis la impostenspezojn.

La oficiala sigelo de la komunumo Moresnet ekde tiam montris la blazonŝildojn kaj de Prusio kaj de Belgio, kun ĉirkaŭskribo en la germana: “NEUTRALES GEBIET VON MORESNET (KELMIS)”.



La “sendependeco” de Amikejo, kiun la enloĝantoj je diversaj okazoj provis emfazi, kulminis okaze de la eldono de propraj poŝtmarkoj kaj arĝentaj moneroj (3 tipoj!) en 1848.

Tiu historia jaro famiĝis kiel jaro de revolucioj kaj de eŭropa anarĥismo. Karl Marx, tiam sin kaŝanta en Bruselo, poste amariĝinte skribis pri la “perfekta ŝtato Belgio, kun paŭperismo kiel plej grava vasalo de reĝo Leopoldo Ia”.



1.a. Averso: Janusokapa busto, montranta maldekstre la kapon de Leopoldo Ia (de Belgio) kaj dekstre la kapon de Frederiko Vilhelmo IVa (de Prusio). Inter perloŝnuroj la teksto: “SUB DUPLICI PRAESIDIO LIBERTAS * 1848 *”

Sub la kapoj la literoj P.(Piéford) R. O.



1.b Reverso: Blazonŝildoj malkompletaj (*mankas la krono kaj super la leono kaj super la aglo!*) de Belgio (maldekstre) kaj de Prusio (dekstre) kaj la franclingva surskribo: “COMMUNE LIBRE DE MORESNET” (“Libera komunumo de Moresnet”).

Krome: premantaj manoj kaj kverko-branĉetoj. Super la du ŝildoj: libereca ĉapelo-simbolo sur parto de stabo aŭ bastono kaj la valorindiko 2 F (2 frankoj).

Sube: litero F + sespinta steleto + marteletto (simbolo de la zinkominejo).





2.a. *Averso*: kiel 1.b.

2.b. *Reverso*: teksto (en la franca): “VIVRE ET PROSPÉRER SOUS LA DOUBLE PROTECTION DE LA PRUSSE ET DE LA BELGIQUE” (“Vivi kaj prosperi sub la duobla protektado de Prusio kaj Belgio”)



3.a. *Averso*: kiel 1.a.

3.b. *Reverso*: kiel 2.b.

Rimarko 1:

Kvankam la moneroj ne oficiale cirkulis kaj kvankam ties origino estas malklara, ili estis menciitaj en la “Revue de la Numismatique Belge” (5a serio, 1869, p. 96-99).

Rimarko 2:

La moneroj de Neŭtrala Moresnet apartenas al la ĝenerala historio kaj cetere al tiu de Esperanto, sed ne al tiu de Esperanto-Numismatiko! Tial ni priskribas ilin en ĉi rubriko.

Rimarko 3:

La moneroj havas noĉrandon, diametron de ĉirkaŭ 28 mm kaj pezas 9,418 gramojn.

Rimarko 4:

La eldonkvantoj estas nekonataj. Krom la tri tipoj en arĝento, ekzistas multaj variantoj (provaĵoj) en oro, arĝento, bronzo, kupro, stano kaj eĉ plumbo. Mankas tamen variantoj en zinko, la fama metalo el la minejo de Moresnet! En la revuo "Numismatica Herentals", n-ro.86 de okt. 2011, Frank Lippens en sia artikolo "Numismatiek van Moresnet" mencias ne malpli ol 35 variantojn!



Unuflanka provaĵo en oro



Unuflankaj provaĵoj en plumbo



Provaĵo en kupro (aŭ bronzo)

Malgraŭ la promesitaj libereco kaj sendependeco de Moresnet, la moneroj nur mallonge cirkulis. Ili nek ricevis oficialan aprobon, nek havis oficialan valoron. La oficialaj pagiloj en Moresnet senĉese estis belgaj kaj ĉefe germanaj. Tio ankaŭ koncernas la tiamajn amikejajn poŝtmarkojn, pri kiuj raportis nia Elda Doerfler en “La Verda Lupeo” de ELF-Arek.

Pro la Traktato de Versailles (1919) Moresnet fine iĝis parto de la belgaj teritorio kaj ŝtato.

La nuntempa kaj la estonta esperantistaroj tamen ne tro bedaŭru la sorton de la eta esperantuja “Amikejo”. La fama antropologo Benedict Anderson nomas ŝtatojn “imaginary communities”, nur elpenaĵo, kreitaĵo de la homa menso! Tio tamen certe koncernas Belgion mem!

Bibliografio (nekompleta)

- *“Nederlandse Bank N.V. section Histoire Monétaire Belge à 1000 AB Amsterdam”*
- *R. Senure: “Dictionnaire Géographique de l’ Histoire Monétaire Belge”*
- *Otto Grosse: “Die Münzenprägungen von Moresnet”*
- *“La Verda Lupeo”, 24-a, marto 1992, p.14*
- *Frank Lippens: “Numismatiek van Moresnet” 2011*
- *Léon Bogart: “Moresnet”, 1972, p.369*
- *Charles Dupriez: “Monnaies Fantaisistes”, 1949, p.365-369*
- *Germain Pirlot: “Coup d’oeil sur Moresnet Neutre, 1816-1919”, Oostende, 1987*
- *Leo Wintgens: “Neutral-Moresnet-Neutre. Ursprung der Vieille-Montagne”, Eupen, 1981*
- *Selm Wenselaers: “De laatste Belgen: een geschiedenis van de Oostkantons”, Antwerpen, 2008*

POR SPUREMULOJ!

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ preskaŭ nenion.


Tial ni kreis tute novan rubrikon "POR SPUREMULOJ". Multaj kapoj scias pli ol nur unu kaj multaj okuloj vidas kaj legas pli ol nur unu okulparo. Do ni petas vin atenti kaj dise rigardi, eĉ demandi kaj spuri kiel kutimis Hercule Poirot aŭ Sherlock Holmes...

Eternaj omaĝo kaj famo estos via rekompenco! Ni anticipas dankas vin ĉiujn!

1a enigmo



2a enigmo



RETPOŜTO

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

19.10.2016 10:48

Kara Bert Boon,

multajn dankojn pro la ĉiam interesa revuo.

Amike

Renato Corsetti

25.10.2016 0:05

Estimata Sinjoro Corsetti, kara samideano Renato,

Via pozitiva reago estas instigo al daŭrigo de niaj provoj kaj penoj por, se eble, plialtigi la nivelon kaj la altiran forton de nia revuo. Tiajn instigojn bezonas ĉiu nova fakgrupo!

Altestime kaj amike,

Bert



19.10.2016 11:06

Kara Bert, dankon pro la informo.

Mi sciis, ke mi estas la sola japana membro de via asocio.

HORI Jasuo

25.10.2016 0:00

Kara Jasuo,

Ne dankinde. Mi scias, ke vi estas multmerita esperantisto kaj “verda” aktivulo koncerne naturkatastrofojn instigitajn de senskrupululoj. Tial estas honoro por ni, ke vi estas membro de ENA.

Prave, ĝis nun vi estas nia nura japana membro. Kiel ŝanĝi tion? Kiel kontakti plejeble multajn japanajn esperantistojn por varbi novajn ENA-anojn? Taŭga konsilo estas ora!

Mi anticipe dankas vin.

Samideane kaj amike,

Bert

25.10.2016 7:43

Kara Bert,

Mi neniam aŭdis pri esperantistoj kiuj havas intereson pri moneroj. Mi sendos informon pri ENA al la retlisto de japanaj esperantistoj.

Jasuo

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

19.10.2016 11:30

Kara Bert!

Mi ne trovis la aldonajn kun la ENA revuo.

Ĉu kulpas mia komputilo?

Plej amike
Ludoviko

20.10.2016 11:45

Kara Ludoviko,

Mi miras, ĉar mi jam ricevis diversajn reagojn de membroj kiuj samtempe ricevis ĝin. Eble kulpas via komputilo. Nu, ne estas problemo, mi denove sendas ĝin al vi nun aldone. Bonvolu konfirmi. Dankon!

Korajn salutojn al vi ambaŭ.

Amike,

Bert

20.10.2016 13:28

Kara Bert!

Nun mi bonorde ricevis kaj ĝuis la ENA Revuon.

Dankon kaj gratulon!

Plej amike
Ludoviko

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

19.10.2016 13:54

Dankon kaj gratulon pro plia informriĉa numero! Mi tralegis laenhavon de la folioj kaj en trankvilo mi legos la detalojn.

Mi nur petas, ke vi ne dissendu ĝin kun malferma adresaro, ĉar tiopovas esti fonto por ĉiuj ni de estontaj virus-dissendoj. Kvankam mi ŝatas vidi la liston de sesdek-kelkaj ricevantoj, bv. uzi ne la "Cc:"-kampon de via mesaĝilo sed anstataŭe "Cco:"-kampon (t.e.,kaŝkopiitaj adresoj).

Kuraĝon al plua esplorado kaj redaktado!

Amike,

James
Brazilo

24.10.2016 23:58

Kara amiko,

Mi dankas vin pro viaj afablaj kaj multe instigaj komentoj. Via rimarko estas prava. Ni okupiĝos eviti tiun eraron. Dankon!

Amike,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

19.10.2016 17:32

Koregan dankon pro la sendo: certe ĝi estas kiel kutime interesege. Mi komentos post ellego!

Plej karajn salutojn via Elda

24.10.2016 23:56

Saluton Elda,

Koran dankon. Mi paciencie, tamen scivole, atendas vian komenton!

Ĝis tiam! Tutkore,

Bert

12.11.2016 6:00 PM

Saluton al vi, mia kara Bert!

Kaosaj tempoj nun ĉe mi (cetere kiel kutime) sed fine mi devas respondi al via ĝentila mesaĝo! Ĉu vi scias ke mi sukcesis legi la EN-on? Sed kiel? Mi presis ĝin, por povi ĝin preni enmane dum la liberaj tempoj, ĉar kiam mi staras antaŭ la ekrano ĉia estas io kiu deturnas min de la devontigaĵoj!

Kion diri? Ke kiel kutime ĝi estas ege plaĉa - vere kompetente prezentitaj la detaloj pri la diversaj medaloj kaj la informoj pri teknikaĵoj, konataj nur de spertaj numismatoj. Kio impresis min estas via "kuraĝo" alturni vin al kiu ajn por ricevi precizajn sciigojn pri la prezentitaj ekzempleroj. Kiam estos libera tempo, mi trafoliumos la "Heroldo de Esperanto"-on en Trovanto, ĉe la Esperanto-Muzeo en Vieno. Kaj fine ĝojiga estas la intereso de tiom da personoj sendintaj mesaĝojn al vi: tiel kunlaboremaj, pretaj al helpemo! Do, kiel kutime - ricevu miajn plej sincerajn gratulojn! Dankon pro via mencio rilate al mia modesta helpo dum UK.

Bonvolu elkore saluti vian Vivi! Al vi firman manpremon kaj karajn salutojn Elda

14.11.2016 17:02

Kara Elda,

Dankon, ke vi povis trovi iom da tempo por trafuliumi kaj legi la lastan numeron.

Ne miru pri mia "kuraĝo" peti informojn. Fojfoje estas la nura vojo por "plenigi truojn". Do mi dankas la iniciatintojn de la modernaj komunikiloj. Sen ili estus neebla tasko eldoni revuon aŭ kompili katalogon. Krome ankaŭ en mia kulturo estas proverbo kiu konstatas: "NE oni jam havas, sed JES oni povus ricevi" Plie, vi scias ke por mi ĉiuj membroj (kaj eĉ iliaj gekonatuloj!) estas kunredaktoroj. Sed neniam devige, kompreneble!

Mi certe ŝatas viajn pozitivajn rimarkojn (ofte tro laŭdaj...), sed ne hezitu mencii malbonaĵojn. Sinceraj rimarkoj estas donacoj por ĉiu kiu pretas plibonigi la praktikon, ĉu ne?

Mi nun lasu al vi ankoraŭ iom da (liber)tempo. Respondo de vi estas ege ricevinda, tamen neniam urĝa.

Korajn salutojn al vi ambaŭ de ni ambaŭ.

Amike via,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

20.10.2016 7:57

Dankon kara Bert. Mi legos.

Fartu bone! Agrablajn sekvajn tagojn!

Amike:Adri

24.10.2016 23:53

Kara Adri,

Tute ne dankinde. Kiam mi priskribos la medalojn kiujn vi afable sendis al mi, mi certe ankaŭ sendos tiun numeron al vi.

Kore kaj danke,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

20.10.2016 8:10

Saluton Bert

Dankon pro la revuo kaj la asocio kiu kreskas!

Mi pripensas mian eblan kontribuon kiel pentristo; mi uzas programon photoshop.

Amike, klube via

dav

24.10.2016 23:50

Saluton David,

Dankon pro via afabla reago. Se vi kreis aŭ kreos pentraĵon rilate al Esperanto, eĉ prefere al esperanta numismatiko, ĝi certe ricevus lokon en nia revuo.

Ĉu mi povas ion sugesti? Vi vidas ke dum la sama jarkolekto por la titolpaĝo ni kutime uzas 4 preskaŭ samspecajn ilustraĵojn. Ĉu tio povus inspiri vin?

Vi scias ke ENA ne havas kason. Pagi ni do ne povas, sed se vi volus libere fari ion por ni, estus granda honoro por ENA.

Samideane kaj amike,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

20.10.2016 19:36

Farite: <http://hdl.handle.net/11013/5166>

Kore,

Ana Manero

Biblioteko Juan Régulo Pérez

www.esperanto.es/biblioteko

biblioteko@esperanto.es

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

21.10.2016 10:13

Kara Bernhard,

hazarde mi trovis en la revuo "Esperanto" de julio 2011 vian tekston koncerne "Esperantomuzeo en Vieno iras interreten". Mi dezirus publikigi la paĝon en nia venontarubriko EL LA GAZETARO.

Ĉu sufiĉus viaj aprobo kaj permeso aŭĉu mi ankaŭ petu UEA-n? Ĉu la teksto laŭ viestas ankoraŭ sufiĉe aktuala?

Dankon anticipan pro viaj peno kajrespondo!

Amike,

Bert Boon
por ENA

21.10.2016 10:32

Kara Bert,

koran dankon pro via mesaĝo. Jes, se vi deziras, vi rajtas publikigi tiun tekston, sed bonvolu noti, ke ĝi jam aperis en julio 2011 en la revuo Esperanto.

Fakte, la Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo en Vieno tre rapide kaj bone evoluiĝas, tial la teksto ne plu estas tre aktuala. Mi ŝatus proponi, ke mi verkos artikolon por vi/via revuo, kiun mi sendos en februaro 2017. Tiam mi povos noti la plej aktualajn informojn de 2016 kaj mi jam povas doni perspektivon pri la jaro 2017.

Amikajn salutojn kaj agrablan semajnfinojn,

Bernhard Tuidier

21.10.2016 18:16

Kara Bernhard,

mi koredankas vin pro via rapida respondo.

Volonte mi akceptas vian proponon verki pli aktualan artikolon por "Esperanta Numismatiko". Tamen mi volas/ devas atentigi vin, ke la 1a numero de la 4a jarkolekto aperos je la fino de januaro 2017, la 2a je la fino de aprilo 2017.

Danke kaj amike salutas vin

Bert

24.10.2016 9:32

Kara Bert,

tre volonte mi verkos artikolon por la numero 2/2017. Ĉu estas bone, se mi sendos la artikolon ĝis la fino de marto 2017?

Korajn salutojn,
Bernhard Tuidar

24.201618:05

Saluton kara Bernhard,

Evidente via artikolo estos bonvena je la fino de marto. Kiel vi sendubespertis trafoluminte nian revuon, porfotoj, bildoj aŭ aliaj ilustraĵoj ni kutime rezervas sufiĉe da spaco. Ankaŭ la okuloj ofte malsatas, ĉu ne?

Hieraŭ mi diĝite vizitis en la vienaj arkivoj la bildojn pri esperantajnumismatikaĵoj. Unue mi konstatis, ke estas ĝis nun sufiĉe malabunda kolekto. Due ke el numismatika vidpunkto la informoj estas malkompletaj. Tio tute ne estas kritiko, male.

Tamen estas kelkaj interesaj objektoj kiujn mi ĝis nun ne trovis. Ĉu estus fojefoje eble mezuri iunmedalon koncerne diametron kaj pezon, kiel ekzemple la kroatan aktualan kuna-moneron, kiu montras nur unu flankon? Mi sincere esperas, ke mia peto ne kaŭzos tro da peno por vi, sed tre probable vi estas la nura persono kiu povus havigi al mi kromajn informojn pri raraĵoj kaj nekonataĵoj en la viena kolekto...

Kore kaj amike,

Bert

25.10.2016 11:01

Saluton,

multan dankon pro via mesaĝo, ni ĉiam ĝojas pri komentoj rilate al la katalog(er)oj kaj diĝitaj dokumentoj.

La mezuroj de la objektoj estas notitaj en la datumbankoj, sed ili nur videblas en la katalogo „Trovanto“, ne en la katalogo „Bildarchiv Austria“. Ĉi-kune mi sendas al vi la ligilon, kiu gvidas al la katalogero de la kuna-monero: <http://data.onb.ac.at/rec/baa12224592>

Korajn salutojn,

Bernhard Tuidar

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

31.10.2016 11:08

Tre estimata S-ro Kang Hongu,

Je la 5a de februaro 2016 mi transsendis al via retadreso leteron de s-ro LEE Jungkee, koncerne proponon kaj peton mian stampi memorigan medalon okaze de la Seula UK en 2017. Aldone mi sendis ankaŭ mian antaŭan leteron al s-ro LEE.

Jen denove la tiaman mesaĝon de LEE Junkee:

Kun danko mi ricevis vian leteron. LKK por Seula UK serioze konsideros vian konsilon kaj rekomendon. Jen mi aldonas retadreson de LKK-ano pri filatelaĵo por Seula UK. Lia nomo estas s-ro Kang Hongu. Mi esperas, ke vi havos kontakton kun li. Kun koraj salutoj. Sincere via. LEE Junkee.

Ankaŭ ĉifoje mi kunsendas al vi mian tiaman leteron al s-ro LEE.

Mi esperas ke vi kontaktos min, ĉar la decido de via LKK estos grava por la numismatika historio de Esperanto, krome por la eldono de la unua "Katalogo de esperantaj medaloj kaj moneroj".

Mi anticipe dankas vin, kara samideano, por konsideri mian proponon kaj sciigi al mi ĉu eldono de UK-medalo estus ebla.

Amike kaj samideane,

BOON Bert (Belgio/ Eŭropo)

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA) (kunligita fakgrupo de UEA ekde 2014)

Ĉefredaktoro de Esperanta Numismatiko

15.11.2016 3:11

Mi pripensas proponon de vi, kaj mi diskutos kun LKK-anoj.
Nun LKK decidis emisii oficialajn poŝtkartojn.
sincere via KANG Hongu

16.11.2016 1:50

Estimataj Sinjoro KANG Hongu kaj Gesinjoroj LKK-anoj de Seulo,

Dankon pro via respondo. Kiel filatelisto mi ege ĝojas pro via decido emisii filatelaĵojn. Samtempe mi kaj multaj aliuloj esperas, ke finfine ankaŭ la numismatoj povus esti feliĉaj pro belega historia memoraĵo, kiu certe ricevus honoran lokon en la unua "Esperanto-Numismatika Katalogo" pri la dua jarcento de Esperanto.

Ĉiel, ni deziras kuraĝon, persiston kaj sukceson al LKK 2017 por akurate plenumi la taskojn necesajn.

Amike kaj samideane,

BOON Bert (Iniciatinto de ENA / finredaktoro de ENA)

29-11-2016 6:38

Estimata S-roBoon-Tudts!

LKK por 2017 decidis emisii medalon, sed ankoraŭ ne decidis kvanton.

Venontjare ni decidis tion.

sincere via

KANG Hongu

29.11.2016 21:24

Tre estimata S-ro Kang Hongu, kara samideano,

Altestime kaj samideane,

Mi ĵus legis vian mesaĝon pri la decido de LKK emisii medalon okaze de la UK 2017. Vi povas imagi ke mi estas tre feliĉa kaj dankema pro tiu decido. Mi sciigos baldaŭ la bonegan novaĵon al la membroj de ENA. Vi povas jam noti mian nomon por tri ekzempleroj de la nova medalo. Mi anticipu dankas vin.

Bert Boon

UEA-delegito/ Iniciatinto de “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA)/ ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”



04.11.2016 4:22 PM

Saluton

Estimata S-ro Bert Boon -Belgio

El Havano Kubo.Mi nomiĝas Ernesto Alila Viart Fernandez.

Mi deziras aparteni al la Esperanto Numismatika Asociokaj mi deziras ricevi registriĝan-formularon por membroj novaj.

S-ro Bert ,sendu ĉion per mia retadreso al S-ro Ernesto Alila Viart Fernandez.

Amike,

esperantisto el urbo Havano.Kubo

Kara samideano Ernesto,

Reveninte hejmen hieraŭ, mi trovis vian leteron el Havano. Dankon!

Mi ege ĝojas povi bonvenigi vin kiel 53an membron de ENA kaj unuan, do nuran kuban membron ĝis nun.

Eble vi jam scias, ke la aniĝo al ENA estas tute senpaga kaj ankaŭ la revuojn vi ricevos senpage.

Sufiĉas ke interesulo el via lando skribu al mia retadreso (bert.boon@skynet.be) "Mi volas iĝi membro de ENA". Onido ne bezonas formularon. Sufiĉas peto, nomo kaj retadreso.

Kiel vi mem trovis la retadreson de ENA? Ĉu hazarde aŭ per alia esperantisto? Tion mi volas ekscii, ĉar kutime mi gratulas membrojn kiuj sukcesas varbi novajn anojn.

Se vi volas (ne devige!), vi estas petata varbi aliajn membrojn en via belega Granda Insulo. Sur la lasta paĝo de la lasta numero (jarkolekto 3, n-ro 4) de la revuo vi trovos taŭgan tekston por dissendi perrete al personoj kies retadreson vi posedas.

Nun jam aldone vi ricevos la laste aperintan numeron de la 3a jarkolekto. Bonvolu konfirmi la ricevon. Dankon!

Ĉar kutime ni sendas al novaj membroj ĉiujn jam aperintajn numerojn, mi hodiaŭ provis sendi al vi la 12 pasintajn numerojn, sed ili revenis, probable pro manko de sufiĉe da spaco sur via komputilo.

Se vi konsentas, mi klopodos sendi ilin unuope al via retadreso dum la venontaj tagoj. Ĉu konsentite?

Ĝis baldaŭa reskribo,

amike via,

Bert BOON

Iniciatoro de "Esperanto-Numismatika Asocio" (ekde 2012)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko" (ekde 2014)



05.11.2016 17:41

Kara Bert!

Vian eldonaĵon ĝis nun mi sukcesis ellegi ĝis la paĝo 12a. Vere mi vidas tre malbone, pro kio mi legas malrapide la tre etajn literojn. Ĝis nun tiu prezentis tre interesan enhavon. Eĉ, mi rememoras la kuponon de Universala Ligo valoranta unu stelon. Mi vidis ĝin ĉe la tiama miakluba prezidanto doktoro Ludoviko Gyóry Nagy. Li montris ĝin al ni geklubanoj. Tiutempe mi volis aĉeti tiun, sed ne sukcesis. Nun mi ĝojas rememori pri ties ekzisto. Mi opinias bona ideo por montri ĝin al la legantoj.

Ankaŭ la plurajn paĝajn dirindaĵojn mi ellegos, ĉar via revuo estas lerta verko. Kiun mi sukcesis varbi al vi?

Amike:Adri

07.11.2016 20:17

Kara Bert!

Nu, mi elegis la tutan revuon kaj konstatis, ke via laboro estas benata. Mi trovas interesa kaj bona vian laboron, do ankaŭ enestonte mi provos varbi membrojn al vi.

Amike: Adri Pásztor

09.11.2016 14:04

Tre kara Adri!

Mi petas pardonon pro la prokrasto de mia reago. Evidente mi volonte ricevis viajn du leterojn.

Mi admiras vian persiston por finlegi la lastan numeron, spite al la "malgrandaj" literoj. (Eble vi povus peti al via nepo montri kiel pligrandigi la tekston...).

Via laŭdo estas samtempe afabla kaj instiga. Mi dankas vin pro tio, plie pro via preteco varbi novajn legontojn por ENA. Bonvolu, se eble, dissendi la tekston sur la lasta paĝo de la revuo. Antaŭdankon!

Aliĝis dume Monika Molnar, hungarino el Svislando, kiu menciis al mi varbleteron kiun vi sendis je la 28a de aprilo al listanaro de "esp- en- hung".

Por modere rekompencio kion vi jamfaris por mi kaj ENA, mi tre baldaŭal via hejmadrosendos koverton kun belega surprizo. Bonvolu unue sciigi vian adreson perrete, mi ne plu trovas vian hejmadreson. Pardonon!

Amike kaj tutkore,

Bert

09.11.2016 19:29

Kara Bert!

Dankojn pro via enletera sciigo pri la demi varbita samideanino. Mi sendis ĝin jam plurloken, sed bedaŭrinde la rezulto estas tre malgranda.

Se vi sendos al mi donacon, tio servos ne nur memoraĵo, sed atentigo al laboro de numismatikistoj por montri al aliuloj vian eldonitan gravan studindan objekton el la pasinto. Scivoleme kaj dankeme mi salutas vin:

Adri



12.11.2016 21:26

Estimata Sinjoro Opoka, kara samideano Włodimir,

Petinte unue helpon al Ludoviko Molnar, mi estis pludirektita al vi. Do, mi nun petas vian helpon se eblas.

En la ENA-revuo estas rubriko pli medalistoj kiuj kreis medalo(j)n por nia movado. De tri medaloj publikigitaj kaj priskribitaj en la 3a numero de la 2a jarkolekto (bonvolu vidi la aldonitan numeron, paĝojn 7,8,9) la nomo, la foto kaj informoj pri vivo kaj artefaktoj estas nekonataj al mi.

Plaĉus al mi se vi povus havigi al mi plejebele multajn informojn pri tiuj artistoj por povi honori ilin en la menciita rubriko.

Mi jam anticipe dankas vin tutkore.

Altestime kaj samideane via,

mi salutas vin.

Bert Boon

Iniciatoro de ENA

16.11.2016 19:24

Estimata Samideano Bert Boon,

mi tre ĝojas, ke vi interesiĝas pri diversaj eldonaĵoj de UMEA.

Ambaŭ medaloj – eldonitaj en la jaroj 1988 kaj 2008 projektis d-ro Krzysztof Kmiec – farmaciisto, kiu faris multajn projektojn por UMEA.

Li ankaŭ projektis oficialan UMEA insignon kaj honoran insignon, krome li ankaŭ projektis afiŝojn kaj insignojn pri IMEK-oj.

Informojn prid-ro Krzysztof Kmiec vi trovos en la kongresa libro pri la 16a IMEK en Krakovo en la jaro 2008 (umeapoka.republika.pl) kaj en MIR en la 96-a numero de MIR (24a volume N-ro 3) sur la paĝo 86.

Mi kunsendas al vi tiun ĉi numeron de MIR.

Kun koraj salutoj

Prof. Wlodzimierz Opoka



13.11.2016 7:46 PM

Tre estimata Sinjorino Faragó, kara samideanino Katalin,

Vian retadreson mi ricevis de Ludoviko Molnar. Mi petas vin se eble helpi min. En numero 3 da la 2a jarkolekto de la revuo "Esperanta Numismatiko" mi montris kaj priskribis la memormedalon de Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo, skizita kaj farita de S-ro Sándor Józszai.

En la revuo de "Esperanto-Numismatika Asocio" troviĝas ankaŭ rubriko pri medalistoj kiuj kreis esperanta(j)n medalojn.

Koncerne Sándor Józszai mi bedaŭrinde havas nek foton, nek informojn pri vivo kaj artefaktoj.

Aldone mi sendas al vi la jam menciitan numeron de la revuo kun plia peto havigi ĝin ankaŭ al la estimata sinjoro medalisto, se eblas.

Mi anticipu kaj kore dankas vin.

Altestime kaj samideane,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA / finredaktoro de EN

14.11.2016 2:02 PM

ESTIMATA BERT BOON! antaŭ kelkaj tagoj oni operaciis mian dekstran okulon pro katarakto ktp./la 07-an de oktobro estis operaciita mia maldekstra okulo /, kaj mi ankoraŭ ne tre bone vidas ...kompreneble mi estas preta helpi Vin, kaj certe post kelkaj tagoj mi solvos Vian peton, elkore estime Katarina Faragó

14.11.2016 16:20

Tre estimata sinjorino,

Unue permesu al mi ke mi deziras al virapidan kaj sendoloran resaniĝon.

Evidente via sano estas pli grava ol mia peto. Nenio urĝas, male, do mi paciencas atendas vian sekvontan leteron kun espereble bona novaĵo pri viaj okuloj. Dankon!

Tutkore kaj samideane,

Bert Boon



02-12-2016 12:05

Estimata Bert Boon,

Kun danko mi legis vian leteron pri ENA.

Jes, mi tute samopinias kun vi pri la graveco de numismatikaĵo.

Mi volonte ricevos vian provnumeron.

Esperante senpaŭzan progreson de via iniciato, mi kore salutas.

Samideane via, Jungkee el Koreio

02-12-2016 18:28

Estimata LIN Junkee,

Kun granda ĝojo mi ricevis vian rapidan respondon. Dankon!

Plaĉas al mi krome, ke ni ne nur estas samideanoj rilate al Esperanto, sed ankaŭ koncerne la gravecon de numismatiko kiel helpscienco de la fako "historio".

Aldone mi jam sendos en PDF provnumeron. Mi evidente esperas kaj deziras, ke ĝi plaĉu al vi.

Kun kora kaj samideana salutoj.

Via,

BOON Bert *

*En mia kulturo oni kutime mencias la antaŭnomon antaŭ la familia nomo. Bert= Albert(o), vira antaŭnomo en la okcidenta mondparto. Mi loĝas en Belgio, Mezeŭropo.

08.12.2016 6:42

Estimata samideano LEE,

Bonvolu konfirmi la ricevon de la ENA- provnumero, kiun mi sendis al vi, por ke mi sciu ĉu mi devas resendi ĝin aŭ ne. Dankon!

Kun samideana saluto de

Bert BOON

Iniciatoro de "Esperanto-Numismatika Asocio"

08.12.2016 3:12

Estimata,

Pardonon mi momente miskomprenis, ke mi jam respondis al vi ricevinte vian karan bultenon.

Jes, mi kun danko ricevis ĝin.

Kun dankoj kaj gratuloj,

Via, Jungkee*

08.12.2016 14:47

Kara Junkee,

El via respondo mi komprenas, ke vi volas aliĝi al ENA, ĉu ne?

Mi do tutkore bonvenigas vin kiel novan membron. Vi estas la 56a kaj la unua (kaj ne la nura en la futuro mi esperas!) membro el Koreio. Gratulon!

Aldone mi sendas en PDF ĉiujn jam aperintajn numerojn de la revuo. Do nenio mankos al vi. La nova numero aperos je la fino de januaro 2017.

Ĉu vi jam sciis, ke la LKK de Seula UK en 2017 emisios memorigan medalon pri la Kongreso? Grava novaĵo por numismatoj!

Mi jam deziras al vi kaj via familo ĉion bonan por la nova jaro.

Numismatajn kaj samideanajn salutojn de via

Bert

08.12.201 15:06

Estimata Bert,

Kun danko mi ricevis vian karan bultenaron.

Mi atente legos kaj poste decidus mian aliĝon.

Morgaŭ mi flugos al Vjetnamio, tial reveninte mi skribos al vi.

Kun dankoj,

Via, Jungkee



04.12.2016 12:38

Estimata samideano,

mi ne estas numismatikisto, sed redaktoro de Starto,
kaj mi povas raporti pri via asocio kaj la gazeto.

Se mi povas ricevadi senpage la gazetojn rete, mi konsentas
pri tio, mi eĉ povas subteni vin morale per aliĝo.

Do bonvolu sendi al mi la gazeton.

Dankon.

Miroslav Malovec

04.12.2016 12:38 PM

Kara samideano,

Dankon pro via pozitiva respondo. Ne gravas, ke vi ne estas numismato, gravas via intereso
kaj via propono esti preta por diskonigi la fakgrupon. Mi do tre volonte sendos al vi la jam
emisiintajn numerojn. Mi esperas ke nia revuo plaĉos al vi. Bonvolu konfirmi la ricevon.
Dankon!

Mi mem estas scivolema pri la temoj kaj la aspekto de via revuo.

Permesu kroman peton. Ĉu vi hazarde scias kiu povus havigi al mi retan adresaron pri ĉefaj
esperantaj muzeoj, bibliotekoj kaj asocioj kun propra biblioteko, kiuj povus deziri nian
revuon?

Fine mi tutkore bonvenigas vin kiel 57an membron de ENA. Se vi hazarde trovus informojn
pri esperanta numismatiko (medaloj, moneroj, artikoloj ktp) bonvolu sendi ilin al mia
retadreso.

Kun kora saluto,

Bert por ENA

04.12.2016 15:09

Kara samideano,

koran dankon pro la senditaj gazetoj.

Se vi volas konsulti nian asocian retejon,
vi trovos ĝin ĉi tie:
<http://www.esperanto.cz/eo/>

Nian Starton vi trovos ĉi tie:

<http://www.literatura.bucek.name/starto/starto.html>

Nur la lastaj numeroj ne estas ankoraŭ liberaj,
ili estas ligitaj al asocia kontizo, nur post jaro
mi povas ilin liberigi.

Mi ne estas certa, ĉu estos loko por numismatiko
en la lasta numero nun preparata. Ankoraŭ hieraŭ
estis sufiĉe da loko, sed mi ricevis tre multajn
kontribuojn pri nia asocia kongreso, kiun mi devas
publikigi prioritare.

Miroslav Malovec



06.12.2016 08:48

Mi konsentas aliĝi al Numismata Asocio. Dankon!

Ali Moradi

08.12.2016 19:11

Kara samideano,

Kun ĝojo ni ricevis vian mesaĝon kun via peto aliĝi al Esperanto-Numismatika Asocio. Ni do kore bonvenigas vin kiel novan, 58an membron. Laŭkutime ni tuj sendas al vi aldone en PDF ĉiujn jam aperintajn numerojn de la revuo kaj deziras al vi agrablan legadon. La nova numero aperos je la fino de januaro 2017.

Ni havas du kromajn demandojn. En kiu lando vi naskiĝis kaj loĝas? Kiel vi trovis nian retadreson? Ĉu iu alia esperantisto sendis al vi informojn pri ENA? Dankon pro viaj venontaj respondoj!

Kun numismatikaj kaj samideanaj salutoj.

Kore, nome de ENA,

Bert BOON

Iniciatoro de ENA

Ĉefredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

09.12.201 17:30

Re-saluton. dankon por sendi la revuojn al mi. Mi estas el Irano, kaj naskiĝis kaj nuntempe loĝas en Karajo urbo. Mi informiĝis pri via revuo el iu afiŝo kiu estis en la Yahoo grupo de nia asocio. :)

Ali



05.12.201618:07

Estimata Profesoro Opoka, kara samideano Vlademiro,

Mi pardonpetas, ke mia reago al via informo tro longe prokrastis. Tamen mi ege dankas vin pro la informoj pri la medalisto de la du UMEA-jubileaj medaloj. La artikolo aperos en la venonta numero de Esperanta Numismatiko.

Mi esperas, ke mia nuna, kroma peto ne tro ĝenos vin. Mi serĉas kromajn informojn pri la probable japana medalisto de la premia Shinoda-medalo. Se vi ne povus helpi min ĉifoje, eble vi konas iun kiu posedas tiujn informojn, mi esperas.

Permesu al mi denove anticipi kaj kore danki vin pro via helpo!

Altestime kaj samideane, en la nomo de ENA,

Mag. Bert Boon

06.12.201615:27

Kara Samideano Boon,

mi ĝojas, ke via bulteno baldaŭ estos aperigita kun novaj informoj.

Se temas pri UMEA Shinoda-Premio laŭ mi precizajn informojn posedas

d-ro Imre Ferenczy Honora Prezidanto de UMEA, kiu estis unu el la unuaj premiintoj.

Dezirante al vi pluajn sukcesojn en via krea laboro mi kore salutas vin.

Vladimiro Opoka



09.12.20168:59 PM

Estimata Honora Prezidanto Imre Ferenczy, kara samideano,

Nia ENA-membro Profesoro Vladimiro Opoka menciis vian nomon kaj alia membro, Ludoviko Molnar, havigis al mi vian retadreson. Mia peto al vi koncernas la belegan medalon emisiitan por laŭdi gajnintojn de Shinoda –Premio.

Por la rubriko “Moneroj & Medaloj” de la revuo “Esperanta Numismatiko” mi serĉas informojn koncerne la gravuriston-medaliston de la medalo, kiel liajn nomon kaj koncizan biografion. Kompreneble, se vi havus tiujn informojn aŭ konus personon kiu povus helpi min. Krome mi ŝatus havi liston de personoj kiuj jam ricevis la premion. Mi scias ke vi estas unu el ili, pro kio mi sincere gratulas vin.

Esperante ke vi povos helpi min, mi anticipe dankas vin.

Altestime kaj samideane,

Mag. Bert BOON (Belgio)

Iniciatinto de “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) ekde 2013

Finredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

UEA- Fakdelegito

09.12.2016 21:44

Tre estimata S-ro Boon,

Koran dankon pro via letero. Sube mi transdonas al vi la liston de la Shinoda Premiitoj. Pri la gravuristo mi scias nenion. Profesoro D-ro Vladimiro Opoka, nia tiama ĝenerala sekretario traktis kun la gravuristo kaj certe li povos informi vin. Ni ĝojus, se en via Revuo nia medalo estus publikigata.

Kun koraj salutoj

via D-ro Imre Ferenczy



22.12.2016 11:18 PM

Kara amiko Ludoviko,

Sendube vi ankaŭ rimarkis ke ĝis nun neniu el nia diskutgrupo povis helpi min trovi informojn pri la kreinto de la shinoda medalo. Ĉu eble iu medicinisto el Japanio povus havigi bazajn informojn?

Pardonu ke mi insistas, sed tio estas la devo kaj la tasko de redaktoro, ĉu ne?

Mi denove kaj tutkore anticipe dankas vin pro nova peno.

Amike,

Bert por ENA

03.01.2017 16:09

Karaj Gekolegoj!

Ĉu iu el inter Vi povus doni informojn pri **lakreinto, medalisto, medalartistode** Zamenhof-memormedalo de la Premio Shinoda? Bonvolu rigardi la aldonajon!

Ĉiu ideo, propono, adreso estas bonvena...

Kun plej amikaj, novjaraj bondeziroj

Ludoviko Molnár

06.01.2017 17:39

Kara Bert,

en eldono de via ENA-revuo mi trovis la indikon, ke la fonto de la medalo estas „Tenshodo, Tokio, Ginza“, ĉu ne? Temas ja fakte pri fama juvelvendejo en la t.n. Ginza-distrikto de Tokio, kiu pluekzistas ĝis hodiaŭ. Jen la retejo (en la japana):<http://www.tenshodo.co.jp/jewelry/tabid/97/Default.aspx>. Se vi trovos kunlaboreman japanan samideanon, kiu pretos traduki, vi certe tie povos enketi pri la iama kreinto-artisto, medalisto...

Kun koraj salutoj,

Christoph

06.01.2017 21:20

Dear Madam, Sir,

I am the president of the International Esperanto Numismatic Society ENA and chief- editor of the journal “Esperanta Numismatiko”. I am searching the name and biographical information about the artist-medallist of the medal shown in the attachment. Concerning the origin of the commemorative medal for Dr. H. Shinoda, I found the following background information: Tenshodo, Tokio, Ginza.

I was informed that the medal was made and distributed by your company. I would be grateful if you could send me the full name of the designer/medallist, a picture of him, some additional biographical information and if possible, his contact- information.

Thank you very much in advance for your effort and response.

Best regards

Bert Boon,

President of ENA

親愛なるマダム、サー、

私はInternational Esperanto Numismatic Society ENAの社長で、雑誌「Esperanta Numismatiko」の編集長です。私は付属書に示されているメダルのアーティストメダリストの名前と伝記を検索しています。篠田博士記念メダルの起源について私は以下の背景情報を見つけました：天保堂、東京、銀座。

私はあなたの会社によってメダルが作られ、配布されたことを知らされました。あなたが私にデザイナー/メダリストのフルネーム、彼の写真、いくつかの追加の経歴情報、可能であれば彼の連絡先情報を私に送ることができれば幸いです。

あなたの努力と対応のために、あらかじめ大変ありがとうございます。

宜しく申し上げます

Bert Boon

ENA会長

07.01.201714:53

Kara Christoph,

Koran dankon pro via atenta legado de la ENA-revuo kaj kompreneble pro la sugesto kontakti la retejon de la fama juvelvendejo. Mi tuj sendis petleteron en la angla kaj en la japana (google-a traduko!) kaj nun pacience atendas reagon. Evidente mi tuj informos vin pri eventuala respondo.

Amike kaj samideane,

Bert por ENA

A N O N C O J

&

E V E N T O J

Esperantomuzeo Vieno: Kolekto por Planlingvoj

Ni ĝoje atentigas vin pri la nova retejo de la Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko.

Kolekto por Planlingvoj: <http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/>

Esperantomuzeo: <http://www.onb.ac.at/eo/museen/esperantomuzeo/>

Pli mallongaj tekstoj, pli da bildoj kaj konciza strukturo zorgu, ke vi facile kaj rapide ricevu deziritajn informojn, kiujn vi bezonas por viaj laboroj en la biblioteko aŭ por via vizito en la Esperantomuzeo.

Ĉi-kune mallonga superrigardo pri la plej gravaj ŝanĝoj:

- La retejo estas plibonigita, por ke vi povu klare legi ĝin sur diversaj iloj kiel (poŝ)komputiloj, tabulkomputiloj kaj saĝtelefonoj.

- Pro la nova menuo vi atingas pli facile la diĝitajn dokumentojn de la Kolekto por Planlingvoj kaj de la Esperantomuzeo – librojn, periodaĵojn, dokumentojn pri la Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj pri la unua mondmilito.

Libroj: <http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/libroj/>

Periodaĵoj: <http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/periodaĵoj/>

Universalaj Kongresoj de Esperanto (1905-1939):
<http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/universalaj-kongresoj-de-esperanto/>

Unua mondmilito: <http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/unua-mondmilito-1914-1918/>

- Sur la hejmpaĝo vi baldaŭ povos vidi interalie novaĵojn kiel novajn dokumentojn (ekzemple antaŭ- kaj postlasaĵojn en la Esperantomuzeo) kaj scienca blogo regule informas pri interesaj temoj rilate al Esperanto, planlingvoj kaj interlingvistiko.

Scienca blogo: <http://www.onb.ac.at/forschung/forschungsblog/>

Ni kore invitas vin viziti nin, ĝuu la foliumadon!

Korajn salutojn kaj bondezirojn,

Bernhard Tuidar

Prelego en Belgio pri Esperanto-Numismatika Asocio

En mia loĝurbo Tienen jam multajn jarojn ekzistas asocio “Numismatica Tienen”, sekcio de “Europees Genootschap voor Munt- en Penningkunde”(Eŭropa Asocio por Numismatiko). Kiel fidela membro mi regule amike interparolas kun la prezidinto, sinjoro Pierre Degel.

Nu, okaze de jarfina solena kunveno kun bankedo en la rondo de belgaj numismatoj, P. Degel serĉis prelegonton kaj invitis min prelegi pri esperanta numismatiko kaj specife pri ENA kaj ties revuo.

Je la 8a de decembro 2016 sub la titolo “Verborgen schatten – Kaŝitaj trezoroj” prelego estis prezentata. En la publiko ĉeestis preskaŭ nur (ne-esperantaj) numismatoj kaj membroj, inter ili sufiĉe famaj fakuloj pri numismatiko, i.a. la ĉefredaktoro de la altnivela “Jaarboek (Jarlibro) van het EGMP”, sinjoro Jan Moens.



Pierre Degel mem enkondukis min, emfazante, ke mi jam en infanaĝo kolektis belgajn monerojn, poste ankaŭ antikvajn monerojn, ĝis min trafis la riĉeco de la Esperanta Numismatiko.



Dum preskaŭ unu horo mi parolis pri esperantaj moneroj, kiel spesmilo kaj stelo, krome pri diversaj, ofte belegaj, medaloj, kiuj en la daŭro de iom pli ol unu jarcento ilustris gravajn eventojn kaj prilumis famajn personojn en la historio de Esperanto. Mi ankaŭ montris unuopajn numismatikaĵojn kaj revuojn per modernaj projektiloj. Mi krome uzis la okazon por propagandi la senpagajn membrecon kaj revuon kaj anoncis la freŝan aliĝon de sinjoro

Pierre Degel.

La publiko tute klare entuziasmiĝis pri la temo, kiel montris ankaŭ poste la reagoj kaj komentoj tute pozitivaj. Kelkuloj eĉ spontane emfazis, ke ili ĵus estis malkovrintaj la enirejon de nova groto de Ali Babao.

Sinjoro Jan Moens, sciante ke mi profesie estas instruista pensiulo pri lingvoj petis min provlegi la nederlandlingvajn tekstojn de la venontaj jarlibroj kaj sendi krome artikolon pri ENA por la Jarlibro 2017.



Kelkaj ĉeestantaj estraranoj de alia asocio, “Numismatica Herentals”, invitis min ekspozicii mian propran kolekton de esperantaj numismatikaĵoj en februaro 2017 dum faka kunveno en la numismatika salono de Herentals.

Dume duherentalsaj estraranoj jam membriĝis kaj tuj ricevis la aperintajn jarkolektojn de nia revuo.

Bert

Se vi hazarde aŭ akcidente forviŝis kompletan numeron de “Esperanta Numismatiko”, vi tutsimple serĉu en Google por trovi la kompletajn jarkolektojn de nia revuo.

Agu tiel:

Google

Skribu en Google: bitoteko.esperanto.es:8080/jspui/handle/11013/7

Klaku: [Bitoteko - Federación Española de Esperanto](http://bitoteko.esperanto.es:8080/jspui/handle/11013/7)

Vi ricevos: **Bonvenon al Bitoteko!**
Jen la bitoteko de Hispana Esperanto-Federacio



Gazetoteko · Hemeroteca Ĉefpaĝo de la sekcio

Iru suben kaj trovu: **Kolektoj en ĉi sekcio**

Pli suben al:



[Esperanta numismatiko \[2014- \]](#)
[Organo de Esperanto Numismatika Asocio](#)

Ana Manero
www.esperanto.es/biblioteko

Biblioteko Juan Régulo Pérez
biblioteko@esperanto.es

Ni tutkore dankas Anan Manero pro ŝia iniciato.



Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu dissendi la suban tekston al plejeble multaj esperantistoj, kies retadreson vi posedas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via helpo estas bezonata! Mi anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, estis fondita en 2013 la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio”(ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum nur tri jaroj ĝis 58 individuaj membroj kaj 16 esperantaj organizaĵoj, bibliotekoj kaj muzeoj, dise en la mondo.

Agrable estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas **SENPAGE** aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”) kaj krome la **NUR PERRETA** revuo ankaŭ estas tute **SENPAGA!** Kaj tio neniam ŝanĝos!

Post aliĝo, vi tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj sekve ĉiujn aperontajn numerojn.(4 n-roj jare).

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en Jarlibro 2016 sur p. 67. Se vi deziras pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be!

Vi rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”